MANIFEST 8a Festa de la DIVERSITAT

Ili volas ke ni kredu ke la mondo ŝanĝiĝis kaj ke ĉiuj devas adaptiĝi kaj fariĝi pli dura, pli batalema, pli konkurenca, pli nefleksebla. Ke la sukceso estas afero de rezultoj, de numeroj, de statistikoj kaj de akumulo.
Ke la sentimentala estas la malvenkinto; kaj la profitema la eterna venkinto.

Sed ni pensas ke la homa estaĵo ne tiom ŝanĝiĝis, ke liaj bezonoj estas la kutimaj kaj la ĉieaj kaj ili nomiĝas estimo, amikeco kaj amo.

Estas ĉi tiuj valoroj kiuj kreskigas lin, pli multe ol kiu ajn objekto, kaj estas la sentoj kiuj helpas kreski, lerni kaj sukcesi.

Ili volas ke ni kredu ke la milita stato estas natura, ke oni devas batali kontraŭ la malamiko, la teroristo, la eksterlandano, tiu kiu parolas alian lingvon, preĝas al alia Dio, minacas nian laborlokon, nian lernejon, nian sanitaran sistemon.

Sed ni scias ke la timo estas malbona konsilanto kaj facila strategio, kaptilo kiu malhelpas pensi kaj esti solidaraj.

Ni scias ke la malfermiteco, la rideto, la emo lerni kaj koni alies kulturon, malaperigas kiun ajn dubo kaj estas fonto de riĉeco, de kunlaboro kaj de paco.

Ili volas ke ni kredu ke ĉiuj novalvenintoj estas bonvenaj kiam la tagoj bonas, la ekonomio bonfartas kaj oni bezonas laborforton, sed ke oni devas resendi ilin al sia origina lando kiam la tagoj malbonas.

Sed ni rifuzas ke oni komparu ĉiun ajn homan estaĵon al komercaĵo. Ĉiu viro, ĉiu virino estas iu historio, iu dramo kaj iu vivo.

Ni rifuzas ke la leĝoj pri enmigrado, kaj tiu de la honto aŭ aliaj, starigu barojn, kotizojn, malpermesojn kaj reprenu forgesitajn diferencojn inter la civitanoj pro ilia deveno, iliaj kredoj aŭ pro ilia haŭta koloro.

Ili volas ke ni kredu ke pensi pri si mem, kaj en la propraj plezuro kaj konsumo estas la komenco kaj fino de la feliĉo kaj krome ke ni devas fidi neniun, nek la kolegon, nek la amikon, nek la parencojn, nek la gefratojn, ĉar la vivo estas longa kaj soleca lukto.

Sed ni memoras ke ĉiuj grandaj progresoj estis kolektivaj, ke la grandajn sociajn kaj politikajn atingojn oni ŝuldas al la amasaj mobilizoj.

Ĉu ili celis malaktivigi nin per sia adoro de la individuo?

Ili volas ke ni kredu ke post la krizo ni daŭre kreskos, kreskos, kreskos ĝis la senfino por krei riĉaĵojn, krei laboron kaj solvi ĉiujn niajn problemojn.

Sed ni memoras ke ni kreskis dum 20 jaroj je freneza ritmo, neniam spertite, ne elteneble por nia planedo, sed la kreita riĉaĵo restis ĉe tre malmultaj manoj kaj tio pligrandigas la diferencojn.

Kaj ni demandas: se ili tiom parolas pri kreskado, ĉu ili celas ne paroli pri distribuado?

Ili volas ke ni kredu ke la krizo falas el la ĉielo, kiel ciklo, tempesto, Dia damno...

Sed ni vidis la superpovan monon kapti la mensojn, la borsojn, la entreprenojn, la altrangulojn, eĉ tiujn kiuj donas konsilojn, sed akceptas nek ilin, nek regulojn, nek impostojn, eĉ nek ŝtatojn.

Ni rifuzas ke tiuj denove diktu la leĝojn, ĉar ni volas kontroli ilin laŭcele ŝanĝi la regulojn.

Ili volas ke ni kredu ke la vorto libereco estas magia vorto, kiu valoras same se oni rilatas al la financoj, al la penso, al la komercaĵo eĉ al la esprimado.

Sed ni scias ke iuj liberecoj premas. Kaj se ni krias: LIBERECO JES, ni rifuzas ke ĝin oni uzu por ekspluati, servutigi, sklavigi aŭ kontraŭi kiun ajn homrajton.

Ili volas ke ni kredu ke la blankulo estas la supera gvidanto de la universo, la civilizanto, tiu kiu portas la lumon al la sovaĝaj kontinentoj.

Sed ni scias ke tiu blanka homo estas ankaŭ la bedaŭrinda inventisto de predanta kaj sen horizonta sistemo, nome kapitalismo.

Kaj ni demandas: kial ni anstataŭ instrui, lernas lerni, lernas malkovri ke en la plej malproksimaj landoj oni pensas pri la estonteco, pri kio restos al la venontaj generacioj?

Kion ni faris al nia planedo?

Ĉu ni fieru pri tio?

Kaj se ni simple lernas peti pardonon, peti konsilojn, kaj ĉiuj kune rekonstrui, ĉiuj kune distribui kaj ĉiuj kune vivi pace?